



Svisa Esperanto-Societo

informas

SES informas

n-ro 2, septembro 2016

**Svisa Esperanto-Societo
invitas al Eksterordinara
Ĝenerala Kunveno**

**22-an de oktobro 2016
en la stacidoma restoracio
10h45 en Chambrelieu
(inter Neŭŝatelo kaj La Chaux-de-Fonds)**

Tagordo:

- Ĝenerala voĉdono pri statutomodifo de UEA
- Propono por firmigo de CDELI
- Agadoplano por la Zamenhofa jaro 2017

**10-a SFERO (Svisa Feria
kaj Familia Esperanto-
Renkontiĝo)**

22-an ĝis 24-a de septembro 2017

Rezervu jam la daton. La venonta SFERO okazos en Tiĉino, supozeble en Rodi (komunumo Prato, Leventino) (pliaj informoj sekvos sur la retejo de SFERO: <http://esperanto.ch/sfero>)

***Post la sukceso de la du Heidi-
libroj en 2017 aperos la fama
infanbildlibro Sonoril-Urĉjo
Schellen-Ursli en Esperanto***

978-3-9524594-2-3

Somero 2017

Kunproduktado de Allsprachendienst
Esperanto GmbH kaj Orell Füssli sub
la aŭspicio kaj per la subteno de
Svisa Esperanto-Societo



**Domfasado en Davos, Foto de Adrian Michel,
Fonto Wikimedia Commons, licenco GNU 1.2**

Protokolo de la Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo

22-an de majo 2016, 14h00, Restoracio Pasejo Hultfegg

Protokolis: Sonia Daubercies

Tagordero 1: Bonvenigo, kontrolo de la ĉeestantoj kaj anonco pri senkulpiĝoj

Didi malfermis la asembleon kaj salutas la ĉeestintojn.

Senkulpiĝis: Claude kaj Andrée Gacond, Stefano Keller, Danielle Carrier, Richard Schneller, Parsival, Ueli Haenni, Oxana Grazdanova, Benno Frautchiger, Koni Rey, Thierry von Büren, Elisabeth de Mestral, Alain Favre, Jun Rooke, Marie-Lou Munger .

Ĉeestis: 16 personoj: Charlotte Blanc-Maillard, Nancy Fontannaz, Nicole Margot, Dieter Rooke, Mireille Grosjean, Carlo kaj Dorothee Baumgartner, Ruth van Puijenbroek, André Sandoz, Liliane Siegrist, Verena kaj Gabriel Chaves, Udo Isaenko, Nelida kaj Didi Weidmann, Sonia Daubercies kaj, per skypo, Luko Allemand kiu studas la germanan nuntempe en Bonn.

Tagordero 2: Aprobo de la tagordo La tagordo estis unuanime akceptita kun modifo, ke la financraporto devas esti traktita antaŭ la senŝarĝiĝo de la estraro kaj la elektoj.

Tagordero 3: Elektro de la protokolanto: Sonia Daubercies

Tagordero 4: Elektro de la voĉnombrantoj: Kiel voĉnombrantoj estis elektitaj Ruth van Puijenbroek kaj Udo Isaenko

Tagordero 5: Evoluo de la membraro: SES nombras 153 membrojn.
2 honoraj membroj: Lucienne Dovat kaj Claude Gacond
Udo Isaenko estas nova membro.
Ni respektis silentis unu minuto en la memoro de Dominique de Mestral kaj Ernst Glättli.
!!! Ne forgesu sendi viajn novajn adresojn au telefonnumerojn.

Tagordero 6: Aprobo de la protokolo de la Ĝenerala Kunveno 2015

La lastjara protokolo kaj jarraporto estis aprobitaj unuanime kaj sen komentoj.

Tagordero 7: Vivo de la societo: Diskuto de la jarraporto 2015

D. Weidmann informis pri diversaj privataj renkontiĝojn kaj eventoj.

- Retrenkontiĝoj
- Sfero en la Lécherette, Vaŭdo
- La foruma ekspozicio de LES
- La koncerto de la konata barbo Manuel ankoraŭ en Lausanne
- CDELI

- GE-klubo kun la famillio Sans
SES administras la Svisan Kalendarojn por diversaj klubaj, lokaj aŭ individualaj aktivecoj
La jarraporto estis unuanime akceptita.

Tagordero 8: Financoj. Prezento de la kasraporto

La financraporton klarigis la kunprezidanto D.M. Weidmann.

Niaj membroj estis malavaraĵ; 7 personoj pagis duonon de la kotizo kaj kelkaj deziras helpi al niaj aktivecoj.

Vi trovas la ligilon en la svisa kalendaro sub ĝeneralakunveno por konsulti la financraporton.

Tagordero 9: Raporto de la kaskontrolanto

La raporton de kaskontrolistoj laŭtleĝis Didi.

Benno Frauchiger Ueli Haenni trovis, la 16-an de majo, la kason en bona ordo.

La jarkalkulo de 2015 prezentas sumon de CHF 38'241.02 kun malprofiton de CH 4'623.68.

Ili rekomendis akcepton de la kasraporto.

Tagordero 10: Senŝarĝo de la estraro

Post la akcepto de la financ- kaj estrarraportoj la ĝenerala kunveno unuanmie senŝarĝis la estraron. Didi kankis la kaskontrolistojn.

Tagordero 11: Elekto de la novaj estraranoj

Nelida Weidmann demisiis kaj Luko Allemand kandidatigis rete.

La ĝenerala kunveno decidis elekti 5 membrojn.

La ĝenerala asembleo voĉdonis kaj elektis Mireille Grosjean kaj Didi Weidmann: kunprezidantoj,

Oxana Grazdanova: kasistino, Luko Allemand kaj Sonia Daubercies.

Tagordero 12: Konfirmo aŭ elekto de la kaskontrolantoj

La ĝenerala kunveno akceptis unuanime ke Benno kaj Ueli estas reelektitaj.

Tagordero 13: Projektoj 2016

La 31-an de marto, la libroinaŭguro de la Esperanto-traduko de **La migro-kaj lernojaroj de Heidi**, de Johanna Spyri, fare de Dieter Michael Weidmann.

Mirejo informis pri la projektoj en la forumo de Friburgo kun la Romandaj inventoj la 11-17an de junio.

La 2-an de julio, la dua libroinaŭguro **Heidi povas apliki, kion ŝi lernis**, en la Johanna-Spyri-Muzeo en Hirzel super la lago de Zuriko.

9-a SFERO (Svisa FERIA kaj Familia Esperanto renkontiĝo) okazos la 16-18-an de septembro, borde de la rivero Doubs, Gîte du Cerneux Billard, 7 km de Villers-le-Lac kaj les Brenets.

Informoj sur <http://esperanto.ch/sfero>

Tagordero 14: Ĝenerala kunveno 2017

La ĝenerala kunveno 2017 okazos la 21-an de januaro 2017 en la Instituto pri Plurlingvismo de la Universitato Friburgo.

Tagordero 21: Eldonado de libroj

Propono pri eldonado de libroj fare de SES kaj Dietrich Michael Weidmann: Aprobo de

Tagordero 15: Projekto AMO 2017 en le Brenets

Dum la ĉielira semajno 2017, 24-an – 28-a de majo, ILEI kun SES kaj UEA organizos AMO (Aktivula Maturigo)-seminarion en Les Brenets

Tagordero 16: JES estis likvidita kiel memstara asocio kaj integrita al SES

JES estis likvidita dum 2015 kiel memstara asocio. Por vivteni la junularan movadon JES nun estas integrita kiel memstara komisiono al SES. La estraro nomas en siaj vicoj unu respondeculon kaj verkos regularon pri la funkciado de JES kaj la uzado de la kapitalo de JES, kiu estas mastrumita en aparta fonudmo de la SES-kasisto.

Tagordero 17: ILEI-Sekcio

Mireille Grosjean informas pri la svisa ILEJ-sekcio, kiu kreskis en de __ membroj en 2014 al __ membroj en 2015.

Tagordero 18: Studoj en UAM

Se iu anoncas sin SES subtenos per simbola sumo de CHF 100.-

Tagordero 19: Nia retejo nia voĉo:

La estraro informas, ke la kunprezidanto Dietrich Michael Weidmann nun prizorgas la retejon kaj ĝin modernigas kaj aktualigas iom post iom.

Tagordero 20: Pliaj financaj rimedoj por Svisa Espero

Estonto de Svisa Espero : Necesas pli da financaj rimedoj por meztempe sekurigi la aperon kaj dissendon de Svisa Espero. La eldonisto konkrete petas aldonajn po Fr. 1200.- el la varba buĝedo por financi la dissendadon de Svisa Espero al ĵurnalistoj kaj parlamentanoj por ĉiu numero de Svisa Espero dum ni ankoraŭ ne sukcesas generi profiton el la vendado de reklamo. La propono estis unuanime akceptita.

GmbH. La subteno okazos simile kiel por Schellenursli per aĉeto de la eldono.

la eldono de Sonoril-Urĉjo (Schellenursli), eldonado de ĝis 4 pliaj poŝlibroj en kunlaboro kun Allsprachendienst Esperanto GmbH ĝis fino de 2017

Por la projekto Schellenursli estis akceptita, ke SES subtenas la eldonadon aĉetante 650 ekzemplerojn la unua eldono de la eldonejo Orell Füssli respektive de Allsprachendienst Esperanto GmbH por la vendista prezo de po CHF 9.- aŭ sume CHF 5850.- - La stokon Allsprachendienst poste laŭ kontrakto kun SES disvendos. La ĝenerala kunveno permesas al la kunprezidanto Dietrich Weidmann en tiu afero kontrakti kun si mem konante la eventualan interesokonflikton.

Same SES subtenas subteni maksimume 4 libro-eldonprojektojn jare en simila dimensio kiel la aperintaj Heidi-libroj en kunlaboro kun Allsprachendienst Esperanto

La tiel aĉetitaj libroj estos metiaj je la akiroprezo (do laŭ la vendista prezo al la bilanco). La ne venditaj libroj estos amortizitaj jare je 20% de la origina valoro – do la stoko post kvin jaroj havos en la bilanco valoron de 0. Oni tamen atendas, ke el la vendo estiĝos profito. Tia profito estos reuzitaj por pliaj eldonaj projektoj.

Tagordero 22: Buĝedoj 2017

La proponita buĝedoj por la jaro 2016 estis unuanime aprobita.

Tagordero 23: Diversaĵo

Neniu petis parolo sub punkto diversaĵoj ĉar la tempo jam tre progresis, sed oni atentigis, ke post la kunveno oni eliru por esplori pri projekto de plantado de Esperanto-arbo

Je la 16h22 la ĝenerala kunveno estis fermita.

Eksterordinara Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo, Chambrelieu, 22-an de oktobro 2016, 10h45

Tagorda punkto 1 – ĝenerala voĉdono de UEA

La statutŝanĝo de UEA necesigas, ke niaj membroj decidu, kiel SES voĉdonu. Tial ni disponigas al vi jen la materialon ricevitajn de UEA, por ke vi esprimu vian opinion:

Letero de Mark Fettes:

Karaj kolegoj,

En ĉi tiu koverto vi trovos voĉdonilon, kaj kun ĝi broŝuron pri diversaj ŝanĝoj proponitaj por la Statuto de UEA. Ni malofte faras tiajn ŝanĝojn – la lasta Ĝenerala Voĉdono pri la Statuto okazis en 1979! Tial mi volas mallonge klarigi la rolon de la Landaj Asocioj en tio, kaj skribi kelkajn vortojn pri la celoj de la nuna propono, kiu venas al vi esence kiel rekomendo de la Komitato de UEA, nia supera gvidorgano.

En Ĝenerala Voĉdono, la voĉoj de niaj aligitaj membroj esprimiĝas pere de la Landaj Asocioj. Ĉiu asocio ricevas nombron da voĉoj egalan al la nombro de aligitaj membroj, por kiuj ĝi pagis la kotizon en la antaŭa jaro. Vi povas trovi la oficialan statistikon pri tio en la aprila numero de *Esperanto* de ĉi tiu jaro (p. 94). Ni konsultis nederlandan notarian pri la voĉdono, kaj tiu konsilis, ke Landa Asocio voĉdonu bloke pri la unuopaj artikoloj (t.e. ne eblas dividi la voĉojn:

sur ĉiu linio de la voĉdonilo oni faru nur unu elekton, kiu do ricevas ĉiujn voĉojn de la asocio pri tiu punkto).

Eble la plej grava ŝanĝo proponita en ĉi tiu Voĉdono estas la jura memstariĝo de TEJO, nia junulara sekcio. Tio respondas al la efektiva evoluo en la lastaj jaroj. Laŭ la proponitaj ŝanĝoj, *UEA kaj TEJO estonte interrilatos kiel du memstaraj asocioj jure registritaj en Nederlando, kun komuna membro-administrado kaj proksima kunlaboro. Nova regularo, kiu difinas tiujn rilatojn, estas jam akceptita de la Komitato; la Statuta ŝanĝo kompletigos tiun evoluon. Aliaj ŝanĝoj celas faciligi kaj pliklarigi la mastrumadon de UEA. Tio inkluzivas uzadon de Interreto (kaj aliaj telekomunikiloj), kaj plurajn ŝanĝojn rekomenditajn de nederlanda notario por konformi kun la nederlanda juro. Fine, ni proponas ankaŭ iom mildigi la postulojn por estonte ŝanĝi la Statuton. Laŭ la nuna Statuto, necesas ke ĉiun ŝanĝon subtenu pli ol duono de ĉiuj eblaj voĉoj. Ni proponas ekde nun rezervi

tiun postulon por la eventuala malfondo de la Asocio. Por statutŝanĝo, sufiĉos – laŭ nia propono – du trionoj de la donitaj voĉoj; do, granda, sed relativa, plimulto. Tiel homoj, kiuj ne voĉdonas, ne povos malhelpi ŝanĝojn kiuj havas grandan subtenon.

Kion fari nun?

En ĉi tiu koverto vi trovos la plenan tekston de la Statuto, kun pli detalaj klarigoj pri la proponitaj ŝanĝoj. PDF-versio estas krome elŝutebla de la reteja adreso

<http://www.uea.org/teko/komitato>, por faciligi komunikadon inter ĉiuj en via Asocio kiuj partoprenos en la decidprocezo. Tiu dokumento espereble donos al vi ĉiujn informojn, kiujn vi

bezonas, por decidi kiel voĉdoni pri la unuopaj artikoloj. Bonvolu nepre atenti la instrukciojn sur la voĉdonilo, inkluzive de la limdato, ĝis kiam ĝi devas atingi la Centran Oficejon por esti valida.

Post la fino de tiu ĉi Ĝenerala Voĉdono, ni intencas malfermi vastan diskuton pri kelkaj aliaj proponitaj ŝanĝoj en nia Statuto, inkluzive de novaj vortumoj de la celoj kaj principoj de UEA. Mi esperas ke via asocio aktive partoprenos en tiu diskuto! Viaj voĉoj ja gravegas por la prospero kaj evoluo de UEA, nun kaj estonte.

Elkore kaj estime,
D-ro Mark Fettes
Prezidanto

Atentu: tiu-ĉi voĉdonilo estas la modelo, kiun plenumigos nia landa asocio post nia baloto dum nia Eksterordinara Ĝenerala Kunveno. Individuaj membroj de UEA ricevos apartan voĉdonilon, kiun ili mem resendu, sendepende de la voĉdono en la ĝenerala kunveno de SES! Do se vi estas kaj individua membro de SES kaj de UEA, vi bonvolu unufoje voĉdoni mem kiel individua membro kaj foje esprimi vian opinion en nia ĝenerala kunveno!

Ĝenerala Voĉdonilo

1. Ĉi tiu voĉdonilo servas al aliĝinta Landa Asocio de UEA por esprimi akcepton, malakcepton aŭ sindetenon pri la proponitaj ŝanĝoj en la Statuto de UEA.
2. La ŝanĝitaj artikoloj estas listigitaj laŭ numera ordo, kun mallonga indiko pri la celo(j) de la ŝanĝo(j). Similan tabelon vi povas trovi aldone al la voĉdonilo, en aparta kajereto. En ĝi troveblas la ekzaktaj vortummodifoj proponitaj kaj la klarigoj pri kialoj de la ŝanĝoj.
3. En ĉiu linio, bonvolu klare marki nur UNU ĉelon: "Jes" se la Landa Asocio estas POR la ŝanĝo, "Ne" se ĝi estas KONTRAŬ la ŝanĝo, kaj "Sind." se ĝi sindetenas. Se en unu linio estas markita pli ol unu ĉelo, la voĉo pri tiu artikolo estos konsiderata kiel nevalida.

Art.	Titolo Ĉefa(j) temo(j) de la ŝanĝo	Jes	Ne	Sd.
1	Titolo kaj daŭro Jura memstariĝo de TEJO			
2	Difinoj Enkonduko de listo de difinoj – adapto al reta epoko			
3	Celoj Klarigo ke UEA estas neprofitcela asocio			
17	Eksiĝo Pliklarigo de la reguloj pri ekxiĝo			
19	Ĉefdelegitoj kaj perantoj Pliklarigo de la nomumo de perantoj			
28	Anstataŭantoj por komitatanoj A Anstataŭantoj de Komitatanoj A – adapto al reta epoko			
30	Organizo Jura memstariĝo de TEJO			
31	Reprezentigo Jura memstariĝo de TEJO			
32	Konsisto Pliklarigo de tio, kiel finiĝas estraraneco			
34	Prezidanto Reprezenta rolo de la Ĝenerala Direktoro			
37	Komitataj kaj estraraj kunsidoj Pliklarigo de la reguloj pri fizikaj kaj retaj kunsidoj			
38	Voĉdonado Pliklarigo de la reguloj pri fizikaj kaj retaj kunsidoj			
39	Komisioj Pliklarigo de la labormaniero per ŝanĝeto en vortumo			
40	Kompenso Pliklarigo de la labormaniero per ŝanĝeto en vortumo			
41	Regularoj Pliklarigo de la labormaniero per ŝanĝeto en vortumo			
44	Administrado Reprezenta rolo de la Ĝenerala Direktoro			
56	Proceduro Ĝenerala Voĉdono – adapto al reta epoko			
57	Kontrolo de la voĉdoniloj Ĝenerala Voĉdono – ŝanĝeto en vortumo			
58	Decido Ĝenerala Voĉdono – distingo inter postuloj por malfondo kaj statutŝanĝo			
60	Malfondo de la Asocio Pliklarigo de la reguloj pri malfondo de la Asocio			

La detalan vortumon de la amendoj vi trovas en la retejo de UEA sub:

[http://www.uea.org/l/teko/komitataj/Statuto de UEA kun amendoj 2016.pdf](http://www.uea.org/l/teko/komitataj/Statuto_de_UEA_kun_amendoj_2016.pdf)

Tagorda punkto 2 – Zamenhofa Jaro 2017

Kiel vi eksciis el la gazetaro, UNESKO metis okaze de la 100-a datreveno de lia forpaso la 14-an de aprilo por la jaro 2017 Ludovikon Lazaron Zamenhofon en la liston de la personecoj, pri kiuj la homaro solene memoru. Pro tio UEA deklaras la Zamenhofjaron 2017. Dum nia eksterordinara ĝenerala kunveno ni kune diskutos kaj planos, kiel ni digne solenos tiun gravan eventon. Jen diversaj sugestoj:

- Malfermo povus esti aperigo de german- kaj franclingva traduko de la libro de Edmond Privat “La vivo de Zamenhof” en paralela dulingva eldono kun libroinaŭgro la 14-a de aprilo
- Tiam estos planita la AMO-seminario dum la ĉielira semajno en Les Brenets (AMO = Aktivula MaturigO, temas pri seminario sub la aŭspicio kaj kun la subteno de UEA)
- Tiam dum 2017 okazos la 50-jariĝo de CDELI, kiun necesos digne festi
- Memkompreneble en aŭtuno okazos la 10-a SFERO (ĉi-foje antaŭvideble en Tiĉino la 22-an ĝis la 24-a de septembro)
- Kaj fine iam en 2017 (la dato dependas de Orell Füssli, kun kiu ni kunproduktas la verkojn) okazos la aperigo de la Esperanto-versio de Sonoril-Urĉjo (Schellen-Ursli/Uorsin), fama originale romanĉlingva infanlibro kun belegaj bildoj.
- Memkompreneble devas okazi diversaj gazetaraj konferencoj kaj memoraj aktivecoj kaj la evento devas esti temo ek de la vintra numero 2016 ĝis fino de 2017 temo en Svisa Espero
- Povas aldoniĝi aliaj aktivecoj de lokaj grupoj kaj de SES kaj ankaŭ de individuoj

Tagordero 3: Firmigo de Cedeli

En la jaro 2017 CDELI fariĝos 50-jara. Ni devas ĉi-tie emfazi por eviti miskomprenojn, ke CDELI estas memstara institucio, kiu ne estas rekte ligita al SES, do SES ne povas ion decidi pri aŭ nome de CDELI – ĉiuj decidoj pri CDELI do estas propra afero de CEDLI kaj ĝia Amikaro. Tamen la bonfarto kaj estonto de CDELI havas esencan signifon por SES kaj precipe venontjare estos la 50-jara jubileo de la fondiĝo de CDELI, kiu ankaŭ kongruas kun la Zamenhofa Jaro. Ni tial devas en SES diskuti en kiu maniero ni povas subteni CDELI, ĝian Amikaron kaj ĝian firmigon kaj certigi, ke la rilatoj de SES al CDELI estu maksimume fruktodonaj kaj pozitivaj. Unu afero, kion SES konkrete povas fari estas disponigi buĝedon por la solenado de la 50a jubileo de CDELI. Ĉar konkreta projekto pri tiu solenado flanke de CEDLI kaj Amikaro de CDELI ankoraŭ ne estis submetita al SES, la estraro de SES proponas, ke la ĝenerala kunveno donu al la estraro la kompetenton mem decidi pri la subvencio favore al la solenaĵo, kiam la projekto flanke de CDELI estos submetita al ĝi kaj ke la ĝenerala kunveno nun nur fiks la supran limon de tia sumo.

Ni elektis Chambrelieu, ĉar ĝi tre bone atingebas: Pro ĝia kurioza kapostacio ĉiu trajno devas halti en tiu tute malgranda vilaĝo... Estas rekta rapidtrajno de Berno al Chambrelieu (de Berno al La Chaux-de-Fonds), kiu alvenas je la 10h38 (ekveturo en Berno 09h53, Neŭŝatelo 10h27, Zuriko 08h32, Uster 08h06, Wil SG 07h40, Neŭŝatelo 09h30, Ĝenevo 09h15, Lucerno 08h05, Lugano 05h10, Bazelo FFS 08h31, La Chaux-de-Fonds 10h02, Porrentruy 08h42, Koire 07h09, Sankt-Maŭrico 05h03, Romanshorn 07h03).

Se vi deziras partopreni la tagmanĝon post la kunveno bonvolu anonci vin per retmesaĝo al ses-informas@esperanto.ch aŭ telefono sub 044 251 50 25. Posttagmeze ni antaŭvidas kulturalan programon. Detaloj sekvas en la Svisa Kalendaro.

Svisa Kalendaro

(eltiro, la kompletan svisan kalendaron vi trovas rete sub

<http://www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro>)

Helpu, ke via avento estos listigita en la Svisa Kalendaro sendante vian informon al ses-informas@esperanto.ch

Oktobro 2016

- 3-an de oktobro 2016, 20h00: Laŭzano, Espace Dickens (Rue Dickens 6): Laŭzana Esperanto-Societo in vitas al **prelego de Cléa kaj Charlotte pri la 101-a UK**
- 3-an, 10-an, 17-an, 24-an, 31-an de oktobro 2016, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: **Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn**
- 7-an de oktobro 2016, 20h00: Laŭzano, Espace Dickens: **Babila rondo**
- 15-an de oktobro 2016, 10h00: La Chaux-de-Fonds, CDELI, Urba Biblioteko: Studsabato de CDELI
- 21-an de oktobro 2016: Laŭzano, ĉe Fracisko Randin, Vallombreuse 14: **Okcidenta babila rondo de Laŭzana Esperanto-Societo**
- 22-an de oktobro 2016, 10h45: Chambrelieu (inter Neŭŝatelo kaj La Chaux-de-Fonds) en la stacidoma restoracio: **Eksterordinara ĝenerala kunveno de SES**
- 27-an de oktobro 2016, 20h00. Zuriko en Kafejo Mandarin (apud Stacidomo Stadelhofen): **Libera kunveno kaj kafoklaĉo**
- 31-an de oktobro 2016, 19h00-20h30, St. Louis (apud Bazelo), Restoracio Porte France, 94 avenue de Bâle: **Verda Faden**

Novembro 2016

- 7-an de novembro 2016, 20h00: Laŭzano, Espace Dickens (Rue Dickens 6): **Kunveno de Laŭzana Esperanto-Societo**
- 7-an, 14-an, 21-an 28-an de novembro 2016, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: **Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn**
- 19-an de novembro 2016, 10h00: La Chaux-de-Fonds, CDELI, Urba Biblioteko: **Studsabato de CDELI**

- 24-an de novembro 2016, 20h00. Zuriko en Kafejo Mandarin: **Libera kunveno kaj kafoklaĉo**
- 28-an de septembro 2016, 19h00-20h30, Mulhouse (apud Bazelo), Kafejo Le Printemps, rue du printemps: **Verda Faden**

Decembro 2016

- 3-an de decembro 2016, 18h00: Ĝenevo, Salon Castafiore, 20 rue Montbrillant, vid-al-vide de la parko Crochettes, **10-a Kasta Festo**.
- 5-an, 12-an, 19-an de decembro 2016, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: **Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn**
- 7-an de decembro 2016, 19h00: Flawil en b'treff (apud la stacidomo Flawil): **Tradicia rakledovespero de la Esperanto-Klubo Wil**.
- 15-an de decembro 2016, 20h00. Zuriko en Kafejo Mandarin: **Libera kunveno kaj kafoklaĉo**
- 17-an de decembro 2016, 10h00: La Chaux-de-Fonds, CDELI, Urba Biblioteko: **Studsabato de CDELI ([vidu pli](#))**

Januaro 2017

- 9-an, 16-an, 23-an, 30-an de januaro 2017, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: **Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn**
- 21-an de januaro 2017, Friburgo, Instituto por Plurlingvisio de la Universitato: **Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo** (detaloj sekvos)
- 26-an de januaro 2017, 20h00. Zuriko en Kafejo Mandarin: **Libera kunveno kaj kafoklaĉo**

Unika etoso dum la 101-a UK en Nitro

De la 23-a ĝis la 30 de julio 2016 la ĉefurbo de Esperantujo fariĝis la historia slovak urbeto Nitro. La familia akcepto en eturbo donis al tiu-ĉi kongreso apartan etoson kaj ĉarmon, kiel oni tion ne ofte povas sperti. Unu el la multaj kulminoj estis la manifestacio tra la urbocentro de Nitro la 29-an de julio.



9-a SFERO inter multaj bestoj

La 16-an ĝis la 18-a de septembro en Ĵuraso pasis en bela familia rondo la 9-a SFERO. Kulmino estis la sabata ekskurso al ekologia farmbieno, kie la infanoj povis ĝui multajn bestojn kaj melki la bovinon Margaritan. Kaj post SFERO jam estas antaŭ SFERO: Rezervu la semajnfinojn de la 22-a ĝis la 24-a de septembro 2017. SEFRO intenceas tiĉiniĝi!



<http://esperanto.ch/sfero>

Kotizoj por SES 2016

Plenkreskuloj ek de 30 jaroj	CHF 35.-
Paroj ek de 30 jaroj	CHF 50.-
Junuloj de 19 ĝis 29 jaroj	CHF 20.-
Infanoj ĝis 18 jaroj	CHF 10.-
Patronoj	CHF 70.-
Nuraj abonantoj de SES informas	CHF 25.-

Kotizojn pagu al la poŝtkonto de Svisa Esperanto-Societo, 2300 La Chaux-de-Fonds:

Poŝtkonto: 17-581908-4

IBAN CH95 0900 0000 1758 1908 4

Adreso de Svisa Esperanto-Societo:
Poŝtfako 9, CH-2416 Les Brenets

Estraro de Svisa Esperanto-Societo:
Mireille Grosjean + Dietrich M. Weidmann (kunprezidantoj), Luc Allemand (protokolanto, junularo), Sonja Daubercies (estrarano), Oxana Grazhdanova (kasistino)

Redaktaj informoj:

SES informas aperas 2-foje jare en februaro (redaktofino jan 31) kaj septembro (redaktofino aŭg 31)

Svisa Espero aperas 2-foje jaro en majo (redaktofino aprilo 20) kaj novembro (redaktofino oktobro 20)

Respondeca redaktisto:
Dietrich Michael Weidmann

Redakta adreso:
SES informas / Svisa Espero
Allsprachendienst Esperanto GmbH
Archstr. 2, Poŝtfako 26, CH-8613 Uster 3
Tel. +41(0)44 251 50 25
Fakso: +41(0)44 261 04 79
Retpoŝto ses-informas@esperanto.ch